# ADORU 920




2. Nobla la celo, brila la vizi',
sorto-plena voko al ĉiel-medi'.
Sorĉis ĝi instige al plenum-labor'
servi-pretajn homojn, indajn je honor'.
Glora, majesta, favor-kora Di',
Vian honor-vokon aŭdis ankaŭ ni.

3. Sankta la tasko, rava ideal',
ekumena revo grava sen egal',
ke komuna lingvo, sama tra la mond',
ligu la gefratojn de l' kristana rond'.
Glora, majesta, favor-kora Di',
por la sama celo kunligiĝis ni.

4. Kontraŭ vaniga, lula apati',
blindaj antaŭjuĝoj, ŝima tradici',
strebis fideluloj kun obstina fid',
venkojn pene gajnis sub la Dia gvid'.
Glora, majesta, favor-kora Di',
venkojn eĉ pli grandajn gajnu ni per Vi!

5. Do, ni en tago de solen-memor',
dankaj pro triumfoj de pasint-labor',
antaŭ Vi, Sinjoro, ĵuras kun sincer'
plue Vin servadi, fortaj en esper'.
Glora, majesta, favor-kora Di',
tenu nin persistaj ĝis la venka hor'!

TAGON FELIĈAN FESTAS NI KUN ĜOJ' • himno por grava dat-reveno en Esperantujo • M (Maccabaeus): Georg Friedrich Händel 1747, Unisono 35, EBL 271, EG 13, RG 370, EM 152, LH 83, HON 503 • E (originale verkita): W. J. Downes 1970 • TK 40